



6(142)
2013

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Julian Tuwim

Kwiaty polskie

[fragment]

Było to gdzieś na przesileniu
Zimy i wiosny nierychliwej,
w porze zamyśleń, rozleniwień
(Leniuch był ze mnie, straszny leniuch);
Było to w pierwsze dni smętnienia,
Za miłosnego bezkrólewia,
W czas ewangelii, czas Szopena
I – KONIA, co na dachu rdzewiał.
Tak. Z okna widać było konia
Metalowego. Stał bez jeźdźca
I dawno nęcił mnie, wałkonia,
By wskoczyć – i galopem z miejsca.
A był to także czas zapatrzeń
w dym, szarość, nudę, czad ponury
I w gwiazdy, słabsze wciąż i rzadsze...
Więc się zbuntujmy i ożyjmy,
Rumaku weterynaryjny.
I wlećmy nad ten Kominogród
W pełen astralnych zwierząt ogród,
W świętego Jana sny prorocze!
Do pierwszej dowież mnie mgławicy,
A kiedy się na Zodiak wtoczę,
Tam cię już puszczę, tam przeskoczę
Na grzbiet Gwiazdzistej Niedźwiedzicy.
Lecz stał jak wryty. Zziąbł i przemókł.
Dym gryzł go w oczy, żarła rdza,
A nie odwrócił nawet łba.
Nawet nie zarżał. Trudno. Nie mógł.

(część 2, rozdział 1)

La polaj floroj

[fragmento]

Okazis ie ĉe la limo
De vintro kaj malfruprintempo,
Dum enpensiga, pigra tempo,
(Mi ege pigris, laŭ l' kutimo).
Okazis en temp' amo-manka,
Dum tagoj de l' aflikta frustrado,
De Ŝopen' kaj de ĈEVAL' stranga,
Kiun tegmente mordis rusto.
Jes. Mi ĝin vidis trans fenestro,
Metalan. Ĝi sen rajdant' netis.
De longe logis min ĉi besto,
Por salti ĝin kaj rajd-impeti.
Kaj estis ankaŭ temp' por spekti
Haladzan mornon, grizon, fumon,
Stelojn tro feblajn por reflekti
En miasm-nebulaĵo lumon ...
Fariĝu viva, laŭ komploto,
Veterinara fer-maroto,
Kaj flugu super Kamenburgon,
Al zodiaka hort' sen fulgo,
Al sanktjohanaj profet-songoj!
Portu min al nebuloz' hela,
Ĉe Zodiako mi vin haltos,
Tie mi lasos vin, transsaltos
Sur dorson de l' Ursino Stela.
Sed mokra staris ĝi, ne provis
Eĉ turni kapon, movi bruston,
Mordis ĝin fumo, voris rusto,
Eĉ ne ekhenis ĝi; ne povis.
(parto 2, ĉapitro 1)

tradukis Lidia Ligeza

Adjektivo **mokra** estas neologismo de prof. Geraldo Mattos (Brazilo) anstataŭanta konatan nocion **malseka**

Julian Tuwim kaj Esperanto

Raporto pri la 33-a Pola Esperanto-Kongreso

Inter la 28-a kaj la 30-a de junio en Lodzo okazis la 33-a Pola Esperanto-Kongreso, kies ĉefa temo estis „Julian Tuwim – de Esperanto ĝis gloro”. Krom krakovanoj: Lidia Ligęza, Grażyna Porada, Magda Tatara, Marketa Wilkus, Adam Wilkus kaj mi, partoprenis ĝin ankaŭ ĉirkaŭ cent dek aliaj kongresanoj. Inter ili estis kelkaj eksterlandanoj kaj kelkaj gejunuloj.

Ni komencis nian vojaĝon al Lodzo ĵaŭde, la 27-an de junio, je 10.25, kiam de la krakova busa stacidomo ekveturis nia aŭtoĉaro vojaĝanta tra tuta Pollando, de Zakopane al Ustka. Post ege laciga, kvinhora veturado ni elbusiĝis ĉe la stacidomo Łódź Kaliska. Tie ni ŝanĝis nian veturilon al tramo, per kiu ni atingis la straton Piotrkowska – la plej konatan straton de la urbo. Ni trovis la straton Traugutta kaj la hotelon „Savoy”, kiu estis tranoktejo de sinjorinoj Lidia kaj Grażyna. En la hotelo ni haltiĝis por trinki kafon kaj teon. Post duonhoro ni ekiris al la Lodza Kulturdomo, kie, krom la kongresejo, lokiĝis ankaŭ la amasloĝejo. Fakte montriĝis, ke la amasloĝejo estos okupata ankoraŭ unu tagon, tamen danke al Robert Kamiński, la loka organizanto de la kongreso, mi ricevis por unu nokto dupersonan ĉambron, sufiĉe komfortan. Ni vespermanĝis en „Savoy”, do mi, feliĉe, ne sentis min sola. Ĉirkaŭ la 21-a horo mi revenis al mia ĉambro kaj tie, laca kaj enuiĝinta, mi ekdormis.

La kongreso komenciĝis vendrede, la 28-an de junio, je la 8-a h. – tiam ankaŭ komencis funkcii la akceptejo. Sur mia nomŝildo estis skribita nomo: „Rano Tobias, Hungario”, laŭ mia reta adreso, tamen mi finfine skribis la nomŝildon kun mia vera nomo. Je la 10-a horo okazis la solena malfermo de la kongreso. Post ĝi okazis prelego de la pola senatano Ryszard Bonisławski, kiu parolis pri Tuwim kaj liaj spuroj en Lodzo. Sekve prezentiĝis lernantoj de la bazlernejo n-ro 199 en Lodzo, kiuj deklamis kelkajn porinfanajn poeziaĵojn de Tuwim en Esperanto. Poste Tomasz Chmielik prelegis pri Tuwim en literatura aspekto. Mi aŭskultis tre atente, ĉar antaŭe mi sciis tre malmulte pri la poeto kaj jen estis bona momento por ekscii ion interesan. Finfine ĉiuj partoprenantoj ekstaris antaŭ la pordo de la kulturdomo por fari komunan foton. Poste, dum la tagmanĝa paŭzo, ni triope iris al la restoracio, kiu ekinteresis nin pro sia nomo, tio estas „W te pędy”. Ĝi ofertis vegetarajn kaj veganajn manĝaĵojn, kio bonege ligiĝis kun la fakto, ke estis vendredo. Por mi mem la cereala-legoma kotleto ŝajnis sengusta, tamen eble nur mi tiel opinias.

Je la 14-a horo ni kunvenis antaŭ la kulturdomo por piedekskursi tra la centro de Lodzo. Ni vizitis kelkajn lokojn, kiuj estis montritaj lumbilde dum la prelego de la senatano Bonisławski. Ni ankaŭ vizitis lokan bibliotekon, kie rigardeblis ekspozicio pri Esperanto kaj la E-movado en Pollando. Dum la ekskurso la ĉiĉeronino ankaŭ anoncis konkurseton. Ĝi estis demando pri tri tipe lodzaj vortoj: *krańcówka*, *migawka* kaj *angielka*. Mi mem konis la unuan, sinjorino Grażyna eksciis pri aliaj, diris la solvon al mi kaj ordonis rediri tion al la konkurs-gvidantino. Mi obee faris tion kaj gajnis premion – porokazan 2-zlotan moneron pri la urbo Lodzo. Revenante, ni estis ĉe la Zamenhof-strato kaj havis okazon vidi memortabulon por li.

Je la 18-a komencis la arta programo. Unue junuloj de Lodza Palaco de Junularo prezentis siajn plaĉindajn kantojn kaj dancojn. Poste Elżbieta Karczewska el Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Lidia Ligęza parolis pri novaj eldonaĵoj – aparte pri „La blanka muso” de Małgorzata Iwanowicz kaj „La balo en opero” de Julian Tuwim, kiujn Lidia Ligęza tradukis. Poste sekvis du prezentadoj: „Konataj kaj nekonataj talentoj de Marta Rak-Podgórska” kaj prelego de Tomasz Chmielik, ĉi-foje pri Lodzermenĉ-oj – lodzanoj de la 19-a jarcento. La preleganto menciis tiam du romanojn: „La promesita lando” de Władysław Reymont kaj „La fratoj Aŝkenazi” de Izraelo Joŝuo Singer, kiujn ambaŭ li esperantigis. Tiutage okazis ankoraŭ programeroj: Leokadia Rózik parolis pri muziko de Remigiusz Kossakowski kaj Roman Dobrzyński prezentis sian filmon-intervjuon kun mortinta ĉi-jare marte Adam Pleśnar – longjara, elstara, vroclava E-aganto. Tiel finiĝis vendredo, la unua kongrestago.

La kongresa sabato komenciĝis je la 9-a per malfermita por ĉiuj Landa Kunveno de PEA-delegitoj kaj diskuto pri Esperanto-movado en Pollando. Mi, Konrad, Ewa kaj Kasia – do, nia malgranda junulara reprezentantaro – partoprenis ĝin nur unu horon, ĉar poste okazis alia ekskurso

tra Lodzo. Fakte, neniŭ el ni volis aŭskulti tiun disputon. Dum la ekskurso ni vizitis inter alie: muzeon en Blanka Fabriko kaj subĉielan muzeon de ligna urba arkitekturo. Post la ekskurso okazis seminario pri edukado, kiun gvidis Ilona Koutny. Sekvis ĝin prelego de Zlatko Tišljar. Je la 17-a horo multe da kongresanoj kolektiĝis en la kapelo de dominikanoj, kie okazis la Sankta Meso en Esperanto. celebrita de tutlanda E-animzorganto, pastro Roman Gmyrek. Por mi mem tio estis interese kaj grava sperto, eble unu el la plej memorindaj.

La sabata arta programo okazis je 18:15. Prezentiĝis: unue Anna Miksa, poste Izabela Trębacz – mezosopranulino, kiu kantis kantojn de Piotr Hertl, fine Joanna Ulowska kaj Maciej Kraszewski prezentis inter alie esperantlingvan kanzonon de ensemblo „Kajto”. Ankaŭ tiuvespere okazis prezento de la nova filmo de Roman Dobrzyński. Bedaŭrinde, mi ne povis ĝin tiam spekti.

Dimanĉe, la unua programero komenciĝis je la 9-a. Prezentis sin EDE (*Europa-Demokracja-Esperanto*) en Pollando. Tiun diskuton sekvis resumo de la kongreso kaj de la Landa Kunveno de PEA-delegitoj. La ĉefa momento de la tago estis tamen la 12-a horo, kiam okazis la solena fermo de la kongreso.

Je 13.15 okazis ekskurso al tombejo ĉe la strato Ogrodowa, kie oni metis florojn sur la tombo de Kazimierz Bein. Poste ni vizitis la komerc-amuzan centron *Manufaktura* kaj du muzeojn. Unu el ili troviĝas en grandioza palaco de familio Poznański kaj nun montras memoraĵojn post famaj civitanoj de Lodzo, i.a.: A. Rubinstein, W.S. Reymont, J. Kosiński, K. Dedecius, G. kaj K. Bacewicz. Nek mi, nek sinjorinoj Lidia kaj Grażyna ĝin partoprenis, ĉar kiam la ekskurso finiĝis, ni jam estis survoje al la stacidomo. Nia reveno daŭris kvar horojn.

La kongreso estis mia unua Esperanto-aranĝo. Mi certe memoros ĝin dum longa tempo. Kvankam la programeroj kelkfoje tute ne interesis min, mi ne opinias tiun tempon malŝparita, ĉar mi pasigis ĝin kun ege simpatiaj homoj. Kaj tiujn ege simpatiajn homojn mi volus dankegi ĉi tie: precipe sinjorinojn Lidia Lięża kaj Grażyna Porada pro ilia zorgo – antaŭ la kongreso, dum la kongreso kaj ĉe la lodza stacidomo, kiam neniŭ sciis, ĉu mi fakte povos ekveturi pro momenta manko de bileto. Sekve mi volus danki sinjorinon Joanna Filipowicz-Choroszuca pro multegaj fotoj publikigitaj interrete, kaj ŝian filinon, Kasia, kiu helpis min ne perdiĝi en tiom da nomoj kaj aferoj. Ĉi tie, ĉe la fino de la raporto, mi skribus ion saĝan, sed mi ne estas sperta esperantisto kaj mi ne kapablas ekzemple kompari tiun kongreson kun aliaj. Mi do povas nur partopreni pliajn aranĝojn kaj provi spertiĝi. Aŭ, espereble, finfine spertiĝi.

Tobiasz Kubisiowski

Hotelo „Savoy” – antaŭmilita, lodza nubskrapulo.

Sepetaĝa hotelo „Savoy”, en kiu loĝis plimulto de kongresanoj, situata ĉe la str. Traugutta 6, estis konstruita en la jaro 1912. Ĝis la jaro 1955 ĝi estis la plej alta, laika konstruaĵo en Pollando. Por konstrui ĝin oni aplikis tiutempe novaĵon – internan, kernan trabaron de konstruaĵo. La hotelan fasadon ornamas multe da secesiaj elementoj, karakterizaj por tiu konstruperiodo. Komence de la XX-a jarcento kaj lodzanoj kaj turistoj estis fascinitaj pro ĝia alteco kaj beleco.

La hotelo estas klimatizita, havas 1-, 2-, 3-personajn apartamentojn kaj ĉambrojn. Por siaj gastoj la hotelo ofertas konferencajn salonojn kun 40-, 50-, 70-, 120-sidlokoj kaj bankedan salonegon.

En la jaro 2008, dum la renovigado de la hotelfrontono, oni revenis al la koloroj uzitaj en la jaro 1912 kaj aldonis sabloŝtonan dekoraĵon de la malsupra parto de la konstruaĵo. Nokte la hotelo estas iluminata.

La hotelo iĝis la heroo de la romano de Józef Roth publikigita sub la titolo „Hotelo Savoy”. En ĝia salono, en la jaroj 1914-1915 amuzigis publikon la kabaredo „Ba-Ba-Bo”. Humoraĵojn skribis por ĝi i.a. Julian Tuwim. En alia fama klubejo „Pickvick”, funkcia iam en la sama hotelo, prezentis sin i.a. Konstanty I.Gałczyński, Józef Węgrzyn, Adolf Dymcza kaj Leon Schiller.

el la Kongresa Libro de 33. PEK

Lidia Ligęza

La hejma kuraco

Mi estis tri jaraĝa kaj kun malfeliĉa mieno kuŝis en liteto. Doloris min la gorgo, la panio ien foriris, enuis min jam la ilustrita libreto pri kornikoj, kiun laŭte legis al mi la paĉjo. Subite li decidis kaj kuraci kaj konsoli min. Alportita al mi glaseto de tokajo okazis tre bongusta por infano, ĉar ĝi estis speco dolĉa. Pro mia videbla entuziasmo la malavara patro donis al mi la duan glaseton.

Kiam revenis la patrino, la infano estis tute malrigida kaj senkontakta. La paĉjo memkompreneble ne informis ŝin pri sia karitata agado. La timigita panjo tuj alvokis la loĝantan feliĉe unu etaĝon pli sube, kuraciston. Li, medicinista gardanĝelo de mia tuta infaneco, apogante la manojn sur konvekso ventro kaj ironie rigardante de sub sia ora binoklo diris: "Al ŝi estas nenio. Ŝi nur estas komplete ebria".

Pri tio, kion diris la panjo al la paĉjo post ĉi akcidento mutas la familiaj kronikoj. Kion ajn malagrablan ŝi dirus, la paĉjo ne meritas entutan kondamnon. Li estis freŝa patro ne entute orientiĝinta agi kun ne tute sana infano. Rolis ankaŭ bonkoreco kaj helpemo. Povis ankaŭ influi lin la amiko, kiu dum la tuta vivo kuracis sin laŭ jena recepto: je la koro kaj kapdoloro – konjako, je la stomako – amara brando aŭ vodko kun pipro, je la gorgo – dolĉaj vinoj kaj brandoj, kontraŭ malvarmumo – pura vodko, kontraŭ malfortiĝo – ĉiuj alkoholaĵoj.

Dum mia eduka procezo, en popollernejo kaj poste, kiam post grandega peno aŭ entute senrezulte mi povis finsolvi matematikan taskon – la panjo ŝate diradis: "Nenio stranga, via patro por ĉiam per tokajo difektis vian cerban, matematikan ĉelon".

Malgraŭ ĉio mi fieras: ne ĉiu povas komenci la veran vivon havante tri jarojn.

Stanislav Kužel

Solulo

Tia forgesita, nigra mallumo tiam estis. Nebulo en ĝi ŝvebe ruliĝis, kvazaŭ ĝi ne sciis, ke la mallumo sola suffiĉas, ke homoj sin sentu forlasitaj. La urbo sub deklivo lumis por si senĝene, neonoj flagretis ruĝe kaj verde, aŭtoj veturadis tien kaj reen, sur trotuaroj hastis lacaj individuoj serĉi vesperan trankvilon aŭ iluzion, ne multaj estis gajaj, pliparte melankoliaj, apatiaj. Enuiga monotoneco de mallumo, kiun la penetrema nebulo de apud rivero faras pli ol naŭza.

Iam scipovas esti naŭza ĉio en la mondo, eble eĉ la plej bela knabino, kiun oni renkontas surstrate kaj kiu al vi subite turnas sian rideton. Ĉar la via ĉi tie ne estas kun vi ...

tradukis Jan Werner

Pavel Svoboda

Naiveco

Sur trotuaro sidis hundido. Tia malpura kaj maldenshara hundaĉo. Ĝi bojĝenis pro malsato. Preteriris sinjoro, prenis pavimeron kaj ĵetis ĝin kontraŭ la jelpanta hundeto. Tiu dezirante plaĉigi sin kaj gajni amon almenaŭ de iu, saltis kaj alportis la ŝtonon reen. Kaj mi tagon post tago staras sub via fenestro kaj vane atendas, ke vi ion kontraŭ mi ĵetos.

tradukis Jan Werner